



PENSEO

N-ro 169

nov./2005

Monata Beletro Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 16-a jaro <http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm>

Profundan kondolencon al s-ro Bakin, Ĉina Granda literatoro!



101-jara Bakin

Vortoj de Redakcio

La 17-a de oktobro, 2005 restos ĉiam en la memoro de ĉinaj esperantistoj, ĉar ĉitage nia karmemora s-ano Bakin forpasis. Kiel ĉina granda literatoro, li postlasis senliman bedaŭron al la ĉina popolo, kaj kiel eternal esperantisto, li donis al ni esperantistoj edifon, kiel pasigi nian vivon batali por nia kara afero. Post lia forpaso, svarmis kodolencaj verkaĵoj memore al li. Profitante de la malvasta spaco de ĉi tiu revueto, ni produktas ĉi tiun specialan numeron por esprimi nian profundan kondolencon al li. Ĉisube ni aperigas la artikolon *Bakin -- Esperantista Pioniro de la Ĉina Literaturo* verkitan de nia Korea s-ano, s-ro Lee Chong Yeong eksprezidanto de UEA, en kiu li faris koncizan prezentadon pri la ordinara kaj signifoplena vivo de Bakin kaj ties literature kariero. Kaj la alia peco, kiun ni speciale aperigas por memorigi pri li, estas lia verketo *Pri Esperanto* el lia eseo-kolekto *Penseroj*.

Redakcio

Bakin - Esperantista Pioniro de la Ĉina Literaturo

Lee Chong Yeong

2005-10-19 14:49:05 19

Forpasis la granda ĉina verkisto Bakin. Li lernis Esperanton en Nankino jam en la 1920-aj jaroj, kaj pere de Esperanto tradukis literaturon al la ĉina. En la 1930-aj li verkis unu el la fruaj majstroverkoj de la ĉina realisma prozo, la romanon "La Familio". Tiu verko poste estis tradukita al multegaj lingvoj. Dum la kultura revolucio en la 1960-aj jaroj la aŭtoro estis kruele persekutata. Poste, en 1980, aperis en Ĉinio esperanta traduko de lia romano "Aŭtuno en printempo", kies titolo estis inspirita de la romano "Printempo en aŭtuno" de Julio Baghy. En la sama jaro Bakin mem unuafoje povis partopreni Universalan Kongreson de Esperanto, en Stokholmo.

En la aĝo preskaŭ 101 jaroj, la 17-an de oktobro forpasis la granda esperantisto Bakin (Ba Jin), unu el la plej konataj ĉinaj verkistoj de la pasinta jarcento, honora prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, membro de la honora patrona komitato de UEA. Pli frue Bakin estis interalie prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo.

En Esperanto aperis pluraj verkoj de Bakin, inter tiuj la granda romano *La Familio* kaj la romaneto *Aŭtuno en printempo*, kies titolo estis inspirita de la romano *Printempo en aŭtuno* de Julio Baghy. Tiun originale esperantlingvan romanon Bakin tradukis al la ĉina jam en 1932.

La nomo Bakin (foje transskribata kiel Ba Jin aŭ Pa Jin) efektive estis pseŭdonimo. La vera nomo de Bakin estis Li Feigan. Li naskiĝis la 25-an de novembro 1904 en Chengdu en suda Ĉinio en bonstata familio, kaj ricevis bonan edukon, studante interalie la anglan.

Jam en 1921 li verkis artikolon kun la titolo "Karakterizaĵoj de Esperanto". Tiam li konis nur la elementojn de Esperanto, sed jam klopodis disvastigi ĝin, ĉar al li plaĉis la idealoj de Zamenhof. En 1923 li translokiĝis unue al Ŝanhajo kaj poste al Nankino, kie li daŭrigis siajn studojn, bone lernis ankaŭ Esperanton, kaj legis ĉiujn troveblajn librojn en Esperanto. Poste, en 1928, li studis en Parizo, kaj tie konatiĝis kun alia granda veterano de la ĉina Esperanto-movado, Hujucz. La plumnomon "Bakin" Li Feigan elektis laŭ du silaboj el la ĉinaj nomoj de siaj du korifeoj, la rusaj anarkiistoj Bakunin kaj Kropotkin. Li admiris radikalajn rusajn verkistojn kaj sopiris iĝi profesia revoluciulo en la kamparo. Sian grandan romanon kun la titolo La Familio li finverkis en Ŝanhajo en 1933.

Dum la milito kontraŭ la japana okupacio en 1937-1945, Bakin migris de loko al loko sed neniam ĉesis verki. Li helpe de esperantaj tradukoj tradukis literaturon al la ĉina, kaj li ankaŭ planis traduki al Esperanto sian romanon La Familio, sed tiun intencon li neniam realigis.

Jam dum la milito alia konata ĉina esperantisto Chen Yuan komencis traduki la romanon. En artikolo pri Bakin li skribas: "Emociita kaj edifita de "Familio", mi tradukis kelkdek paĝojn dum milita periodo. S-ro Ĵelezo kuraĝigis min tion daŭrigi kaj promesis, ke li helpos publikigi la tradukon. Sed bomboj de japanaj invadintoj detruis mian hejmon kaj ankaŭ mian tradukon."

Dum la kultura revolucio (1966-1976) estis persekutata kaj sendita al "reedukado per laboro" laŭ la ordonoj de Maŭ Zedong. Dum

tiu periodo, kiun li pasigis en la Kadra lernejo de la 7-a de majo, alinome "La bovinejo", li hazarde trovis la Dian Komedion de Dante. Nokte en "la bovinejo" li sekrete kopiadis la tekston mane, kaj tage, laborante en la kampoj aŭ ricevante kolektivajn kritikojn, li silente recitis al si la poemojn de Dante.

En 1982, kiam jam pasis la teruroj de la kultura revolucio, kaj en Ĉinio povis aperi liaj verkoj en esperanta traduko, li diris: "Pasis pli ol 40 jaroj, dum kiuj mi travivis la ok-jaran Kontraŭjapanan Rezistmiliton kaj la dek-jaran Kulturaran Revolucion, tamen mi neniam perdis amon al Esperanto."

Jam pli frue, en 1980, Bakin flugis al Stokholmo por unuafoje partopreni la Universalan Kongreson. Tiam li diris: "Antaŭ mia vojaĝo miaj amikoj admonis min, ke en tiel granda aĝo mi ne partoprenu tian kongreson. Ili ne sciis, ke en la pasintaj jaroj mi neniam perdis intereson pri la internacia lingvo. Kaj post la kongreso mi havas pli grandan fidon al Esperanto. Esperanto certe fariĝos komuna lingvo de la homaro."

Laŭ la ĉina kutimo oni festis la centjaran jubileon de Bakin jam en novembro 2003, kiam komenciĝis la centa vivojaro de Bakin. Tiam en Ŝanhajo estis prezentitaj kvar diversaj scenaj versioj de lia romano La Familio: kiel tri diversstilaj klasikaj ĉinaj operoj, kaj kiel modernstila teatraĵo. En la naskiĝloko de Bakin, Chengdu, jam en 1987 estis konstruita tuta ĝardeno kun la nomo Huiyuan. La ĝardeno prezentas la scenojn de la konata romano de Bakin.

Pri Esperanto

Bakin

La lasta peco de Penseroj estis verkita en malsanulejo. Nelonge post elhospitaliĝo, mi veturis al Norda Eŭropo. Antaŭ mia veturado eksterlanden, mi malvarmumiĝis, kaj kiam mi atingis Stokholmon, mi suferis de bronkito.

Por la malsana turmentado de lasta fojo, mi alparolis al la kamaradoj de la ĉina ambasadorejo en Svedio pri mia nuna malsano. Vespere ŝanhajano, kiu studis tie, venis por kuraci min. La sekvantan tagon, la kamaradoj de la ambasadorejo alportis kaĉon, nudelojn kaj fruktojn al mi. Mi sentis familian varmon eĉ en la hotelo. Antaŭan tagon, kiam mi elflugmaŝiniĝis, mi pensis, ke mi atingis landon tute fremdan al mi. La duan tagon mi jam vidis tiom da karuloj. Kvankam mi loĝis malpli ol du semajnoj en la sveda ĉefurbo, mi vivis senzorge kaj plezure. Ĉe la momento, kiam mi forlasis la pitoreskan kaj pacan urbon konsistantan el sennombraj insuletoj kaj ligitan per pli ol sepdek pontoj, mi eĉ sentis, ke mi estas en bona sano.

Mi veturis tien por ĉeesti la 65-an UK. Nun mi ne estis tiel klara, kiam mi eklernis Esperanton, eble de 1918, la antaŭa jaro de la Movado de la kvara de Majo (1919), aŭ eble de 1921. Tamen mia konstanta kaj serioza lernado de Esperanto okazis dum 1924 kaj 1925. Tiam mi lernis en Nankino. En mia postkurso tempo, mi legis unu post alia librojn poŝte aĉetitajn de Esperanta Librejo en Ŝanhajo, kaj finlegis ĉiujn aĉetebajn, kvankam malmultajn. Kiel memlernanto, mi nur legis, nekutima al parolado en Esperanto. Poste mi korespondis kun du aŭ tri francaj amikoj. Je la komenco de decembro, 1928, kiam mi revenis al Ŝanhajo, en hotelo min vizitis Sofio, mia amiko, kiu siatempe servis kiel sekretario aŭ konsilanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Li diris al mi, “La domo de la asocio estas vaka. Kial ne transloĝi tien por kelkaj tagoj?” Tion mi faris. Endome de la asocio situanta en Strateto Hongxingfang, mi loĝis tie per kanvasa faldebla liteto por proksimume duonmonato. Post kiam mi luis domon en strateto Baoguang, mi forlasis Strateton Hongxingfang. De tiam, mi fariĝis ano de la asocio, kaj iom poste ties konsilanto, kaj ankaŭ donis helpon al la asocio.

Intertempe mi elesperantigis kelkajn librojn kiaj unuakta teatraĵo *La Floro de la Pasinto* de de itala E. Amicis, dramo *Morto de Danton* de soveta A. Tolstoj, *Danco de Skeletoj* de japana Ujaku Akita, kaj originala romaneto *Printempo en Aŭtuno* de hungara Julio Baghy. Ĝis kiam, okaze de la evento “la 18-a de Januaro”, la kanonfajro cindrigis la strateton Hongxingfang, mi transloĝiĝis el Zhaibei, norda distrikto de Ŝanhajo. Pro “forpereigo” de Ŝanhaja Esperanto-Asocio, mi forlasis la lokan E-Movadon.

Dum la dek-jara terura plago (Kultura Revolucio — tradukinto), “Kvarpersona Bando” pere de Ŝanhaja Kompartia Komitato kondamnis min kiel “kontraŭrevoluculon” nominalan kaj neniigis min je la rajto de verkado. Poste mi faris kelkajn tradukojn en sekreto kaj, neokupite, foliumis Esperantajn librojn troveblajn en mia hejmo. Kaj iom post iom la Esperantaj vortoj, kiuj mi jam forgesis, fariĝis konataj al mi. Ŝajnis, ke mi kvazaŭ troviĝis en miaj junaj tagoj, kaj pli grandiĝis denove mia intereso pri Esperanto. Pro tio, mi ĉeestis al ĉijara UK. Antaŭ dekoj da jaroj, mi aŭdis pri tia universala kongreso. Kaj kiam mi estis en la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, mi aŭdis okazajn babilojn en Esperanto. Sed nun en kaj ekster la kunveno ĉie vidiĝis intimaj kaj ridetantaj vizaĝoj, kaj ĉie aŭdiĝis amikaj babiladoj, tre fluaj kaj naturaj, en la sama lingvo, kvankam tiuj babilantoj devenis de kelkdekaj landoj. En la kongresejo, oni prelegis kaj diskutis Esperante tiel sperte kiel ili faris en siaj propraj lingvoj. Sidante tie, mi ŝajne sentis, ke mi partoprenas en harmonia familia kuniĝo. Tio estis la unua fojo por mi, sed tio, kion mi sopiris al kaj imagis por multaj jaroj, estis tia okazo. Mi sentis bedaŭron, ke mi ne povas libere uzi ĉi tiun lingvon. Iliaj paroloj en Esperanto kvazaŭ fluis senĉese el fonto aŭ eligus kantojn kaj ariojn, kio estis vere raviga. Tamen Esperantaj vortoj el mia buŝo senmoviĝis kvazaŭ

nepoluritaj ŝtonetoj amasigitaj. Sed mi ne seniluziiĝis, ĉar la junuloj el la Ĉina Delegacio parolis flue kaj prete. Ili faris multajn amikojn kaj babiladis harmonie kun tiuj. Ili estis surmetitaj per nia espero.

Antaŭ ol mi forveturis al Norda Eŭropo, amikoj deadmonis min partopreni la kongreson, kaj unu amiko eĉ detenis min, konsiderante, ke mi ne devu sin okupi tiamaniere pro mia granda aĝo. Tamen ili neniel imagis, ke dum ĉi tiuj jaroj mi donis konstantan atenton al la problemo de internaciaj lingvoj. Pere de ĉifoja kongreso, mia kredo pri Esperanto plifortiĝos. Esperanto certe fariĝos la universala lingvo por la tuta homaro.

Ĉinoj nomas Esperanton *Shi Jie Yu* (monda lingvo), kiu estas bona esprimo miaopinie. Post 93-jara provado, Esperanto kreita de polo Zamenhof jam fariĝis la sola *Shi Jie Yu* agnoskita de la tutmonda popolo. Ĝi senĉese riĉiĝas, disvolviĝas kaj fine postviviĝas kiel vivanta lingvo. Kiam mi eklernis ĝin, nur maldika vortaro kompilita de Kabe disponeblis, sed nun mi povas uzi Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto kun pli ol 1300 paĝoj. Ververe Esperanto disvolviĝas kaj ĝia aplikado pliampleksiĝas. La maljunuloj kiel mi okupis nur malmulton de pli ol 1700 partoprenantoj. La kongresejon regis vigleco kaj amikeco.

Por renkonti miajn svedajn amikojn en Stokholmo, mi devis partopreni en nemalmultaj aktivadoj ekster la kongresejo. Ĉe renkontiĝo, antaŭ ĉio ili demandis al mi pri Esperanto, dubante, ĉu ĝi povos fariĝi vera *Shi Jie Yu*. Pro tio, mi diskonigis ĝin kaj klarigis mian opinion, ke ĝi certe disvolviĝos grandpaŝe, sed ĝi ne anstataŭigos la lingvojn de ajnaj nacioj kaj popoloj kaj nur fariĝos ekster tiuj lingvoj la helpa lingvo komune uzata, kiun ĉiu nacio povos per ĝi komuniki kun la alia. Mi ofte pensas, ke se ĉiuj lernu ĝin, certe novaj situacio kaj stadio aperos. Se la

tuta mondo estus la kongresejo de Esperanto! Kun multaj avantaĝoj kiel aliaj artefaritaj lingvoj, ĝi estas facile lernebla kaj komprenebla, ne nur por eŭropanoj, sed ankaŭ por ni azianoj kaj aliaj nacioj. Ĉar ĝi, kiel artefarita lingvo, viviĝas surbaze de uzado, ĝi certe evoluigos kaj ŝanĝigos por ĉiam, de simpleco al komplikeco, de malriĉeco al riĉeco kaj plia riĉeco, tiel ke, ĝi povos akumuli sian kulturan heredaĵon...

Reveninte de la kongresejo de Esperanto al mia kabineto en la okcidenta ĉirkaŭurbo de Ŝanhajo, mi naskis multajn pensojn antaŭ la malfermita dika PIV en la kvinta nokto. Je la penso de reformado de ĉinaj ideografiaĵoj, mi ne povis ne elmeti kelkajn dubojn. Ĉu ni vere abolos nunajn ideografiaĵojn kaj adoptos la Hanlingvan Fonetikon anstataŭe? Ĉu ni povos deteni niajn junajn generaciojn de nia brila kaj riĉa kultura heredaĵo? Mi ne tute oponas kontraŭ la reformado de ĉinaj ideografiaĵoj. Tio, kio devas esti forigita, forigu! Tamen la reformado kaj disvolvigo de la lingvo celas precizan esprimadon de pli komplikaj pensoj de homoj, sed ne nur simplan kaj facilan lernadon. En Svedio, Eŭropo, Japanio..., oni havas du tagojn por ripozo, kaj ĉu ni ĉinoj eĉ ne havus tempeton por lernado pro okupiteco, ĉu ni eĉ ne havus tempeton por lerni unu aŭ du vortojn, ĉu ni eĉ ne kovus pli komplikajn pensojn pro okupiteco, ĉu ni nuntempe bezonas plialtigon de la popola klerigo aŭ troan plisimplitigon de nia lingvo? Mi vere ne komprenas. En la lando kun pli ol naŭ cent milionoj da loĝantoj, la reformado de la lingvo devas esti farita de ĉiuj. Estas ne malbone, se ni diskrete aŭskultas al alies opinioj.

24-08-1980

tradukis **Vejdo**

Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

E-poŝto: vejdo@elerno.net

Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin turnu al www.elerno.net/penlisto.htm
